

SUDFRANGIA STELO

N° 143

4a kvaronjaro 97
Jarabono : 35 F



Federacio de
Langvedoko - Rusiljono
CCP 956-28 P Montpellier

1998

Komenciĝas nova jaro, ĝi estos **escepta**. UEA fariĝos 90jara, UFE centjara. Universala kongreso okazos en Aŭgusto en nia regiono.

Preparlaboroj por la UK progresas. Via helpo estas **nemalhavebla**. Se vi ankoraŭ ne proponis vin, faru nun !

En Esperantio projektoj multas ; nur per **solidareco** ili estas realigeblaj. Vidu en tiu numero kelkajn alvokojn !

Ankaŭ niaj grupoj preparas diversajn aranĝojn ; la grupoj de Béziers kaj Montpellier invitas vin al la **staĝoj** de Batipau-me en junio kaj Lazaret en septembro. Jam notu la datojn ! Se vi partoprenos la UK, kelkaj tagoj en Agde por praktiki **esperanton** certe ne estos malutilaj. Ankaŭ regule partoprenu la grupkunvenojn ! E° estas facila lingvo sed regula praktikado tamen necesas.

Tiu-ĉi numero de SFS estas ankaŭ escepte dika pro la aldono de la broŝuro de nia sen-laca amiko Leo Lentaigne : "parolas veterano" . Legu ĝin dum la vintraj vesperoj ! (aŭ donacu ĝin, eĉ al komencanto, se vi jam posedas ĝin). Ni volas tiel omaĝi al unu el niaj konataj veteranoj .

Fine vi rimarkos modifojn en la prezento de SFS. Nova jaro, nova vesto !

Bondezirojn al vi kaj esperanto por 1998 !

Jean Hénin

Une nouvelle année commence, elle sera **exceptionnelle**. L'association universelle d'espéranto fêtera ses 90 ans, l'union française pour l'espéranto ses 100 ans. Un congrès universel aura lieu dans notre région au mois d'Août.

Les préparatifs du congrès progressent. Votre aide est **indispensable**. Si vous ne vous êtes pas encore proposé(e), faites le maintenant !

En Espérantie les projets foisonnent ; ce n'est que par la **solidarité** qu'ils peuvent se réaliser. Voyez quelques appels dans ce numéro .

Nos groupes également préparent diverses manifestations ; les groupes de Béziers et de Montpellier vous invitent aux **stages** de Batipau-me en juin et du Lazaret en septembre. Notez déjà les dates ! Si vous participez au congrès universel de Montpellier, quelques jours à Agde pour pratiquer l'espéranto ne seront certainement pas inutiles. Participez également de façon régulière aux réunions de votre groupe ! L'espéranto est une langue facile mais une pratique régulière est cependant nécessaire.

Ce numéro de SFS est également exceptionnellement épais en raison de l'ajout de la brochure de notre inlassable ami Léo Lentaigne : « un vétéran raconte » . Lisez-la pendant les soirées d'hiver (ou offrez la, même à un débutant, si vous la possédez déjà). Nous voulons de cette manière rendre hommage à l'un de nos vétérans bien connus.

Enfin, vous remarquerez des changements dans la présentation de SFS. Une nouvelle année, de nouveaux habits !

Meilleurs vœux à vous-même et à l'espéranto pour 1998 !

Esperanto Congrès mondial à Montpellier

La ville de Montpellier accueillera du 1er au 8 août prochain le 83e congrès mondial d'espéranto au Corum de Montpellier. Le dernier congrès mondial en France avait eu lieu à Marseille en 1957 avec plus de 1 400 participants. Celui de Montpellier devrait rassembler près de 4 000 personnes et sera l'occasion de célébrer les cent ans du mouvement espérantiste français.

M. L. 12 XII

53a kongreso de SAT-AMIKARO



St Brieuc-Quintin

ESPERANTO

LANGUE INTERNATIONALE DES HUMANISTES

11, 12, 13 avril 1998

MONTPELLIER

01 - 08
aŭgusto
1998



83-a Universala Kongreso
de Esperanto

Adresses de la fédération à noter :

Trésorière : Lucette Négron, 40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel
Secrétaire : Charles Gérard-Voincon, 4 Rue Dr Rives 66000 Perpignan
Président : Jean Hénin (voir dernière page)

Kotizoj, kotizoj, kotizoj :

Konata refreno je la komenco de ĉiu jaro !
Ne forgesu reaboni al SFS ! Malgraŭ plibonigo de la bulteno kaj diversaj suplementoj, ĝi restas je la sama tarifo : 35 F ! La n° de la poŝtĉekkonto estas sur la frontpaĝo ; la adreso de la kasistino estas : S-ino Négron
40 Chemin des Amandiers 34400 Lunel.
Estas daŭre permesate kontribui al SFS.
Ni petegas la grupojn kolekti la kotizojn kaj sendi ilin unufoje kun listo de la adresoj.
Evitu al ni malagrablajn realvokojn !

UEA kaj UFE :

Se vi bezonas aliĝilon, kontaktu SFS !
Membro de UEA (kun jarlibro) 120F-UMJ
Membro kun la parto de « 50F-UMG
Membro :jarlibro+«esperanto» 310F-UMA
TEJO (se malpli ol 30 jaroj)
M. kun jarlibro kaj 2 revuoj 120F-MJT
M. kun jarlibro kaj 3 revuoj 310 F-MAT
UFE
Aktiva membro 300F-FMA
Paro (same) 450F-PK1-2
Simpla membro 100F-FSM
Dumviva membro 6000F-FDM

Universala Kongreso de Montpellier :

Atentu, ke nun validas ĝis la 31a de Marto nova tarifo : ne individua membro de UEA 1197 F
Individua membro : 958F, kunulo aŭ junulo aŭ handikapulo ne individua membro : 725 F
same sed individua membro : 479 F. Peras UFE

SAT-Amikaro :

Kotizo kun abono : 180F Junuloj : 90 F
Abono sen aliĝo : 160 F
SAT : membro-abonanto : 290 F,
emeritoj : 220F ; senlaboruloj,gejunuloj ĝis 20 jaroj : 145F, samfamilianoj : 70 F.

Abonoj :

Aldone al la konsiloj de la frontpaĝo, estas ankaŭ konsilinda regula legado de revuoj kaj gazetoj en esperanto. Vi trovos dekstre liston de aboneblaj revuoj pere de UFE .

UK de Montpellier :

Daŭre vendiĝas afiŝoj kaj glumarkoj pri La UK. Afiŝo (60x80cm) kostas 25F kun sendokostoj, ĉiu aldona afiŝo nur 10 F .
Nova serio de glumarkoj estas nun vendata . La koloro estas pli malhela bluo (kolekte-muloj konservu !). Folio de 32 glumarkoj kostas 25 F, ekde 10 folioj : 20F/folio.
Kasistino de la kongreskomitato :
Gisela Passarella, 10 Impasse Ecole J.Ferry
34290 Servian

ABONOJ 1998 – Prezoj en francaj frankoj (FRF)

Peradas por vi ESPERANTO-FRANCE, 4 bis rue de la Cerisaie, Paris 75004. Telefono: 01 42 78 68 86 – Telekopiilo: 01 42 78 08 47.

Brita Esperantisto (6 n-roj)	142,-
Dia Regno (12 n-roj)	65,-
El Popola Ĉinio (12 n-roj)	192,-
El Popola Ĉinio (12 n-roj) (aerpoŝte)	310,-
Esperanto (por NE membro-abonanto de UEA, 11 n-roj)	200,-
Espéranto-Actualités (en français) pour 5 ans	200,-
Esperanto-dokumentoj (angle aŭ Esperante) (por 10 n-roj)	155,-
Eventoj (pri la Esperanto-movado) (24 n-roj)	230,-
Eventoj (aerpoŝte)	270,-
Fonto (literatura revuo) (12 n-roj)	140,-
Franca Esperantisto (por NE aktivaj membroj de UFE) (11 n-roj)	200,-
Heroldo de Esperanto (pri la Esperanto-movado) (16 n-roj) (aerpoŝte)	190,-
Juna Amiko (interlemeja revuo) (4 n-roj po 32 p.)	
– 1 ekzemplero	55,-
– 2 ĝis 5 ekz-oj je la sama adreso	45,-
– de 6 ĝis 24 ekz-oj je la sama adreso	30,-
Kontakto (por NE-TEJO membroj) (6 n-roj)	120,-
Kulturaj kajeroj (Grésillon) (4 n-roj)	80,-
La Domo (revuo de profesioj kaj servoj) (4 n-roj)	120,-
La Kancerkliniko (politika, kultura, ajnista) (5 n-roj)	125,-
La Ondo de Esperanto (socikultura, el Ruslando) (12 n-roj)	130,-
La Skolta Mondo (por infanoj) (6 n-roj)	30,-
(por plenkreskuloj) (6 n-roj)	90,-
Lingvaj Problemoj Lingvo Planado (3 n-roj, po 100 paĝoj)	255,-
Literatura Foiro (6 n-roj)	170,-
Literaturaj numeroj de Franca Esperantiso (3 n-roj)	105,-
Litova Stelo (6 n-roj)	68,-
Monato (internacia magazino pri politiko, ekonomio kaj kulturo) (12 n-roj)	240,-
Monato (aerpoŝte)	275,-
La Jaro (poŝkalendaro de Monato)	31,-
La Jaro (aerpoŝte)	43,-
Rok' Gazet' (pri muziko) (2 n-roj jare; abono por 4 n-roj)	100,-
Verda Lupeo/Fenikso (filatelio) (4 n-roj)	105,-

Abonoj validas por la kalendara jaro krom por *El Popola Ĉinio*, kies abono povas komenciĝi en iu ajn monato.

Grupgvidantoj informu kasiston kaj anojn pri nia aktualigita listo.

Novembra aŭ decembra pago (per ĉeko al UFE-sidejo) garantias akuratan kaj seninterrompan servon). Se post 2 monatoj (por EPC tri) vi ne ricevas la revuon, bv. informi UFE – ne la revuon.

Abonigi geamikojn el nepagipovaj landoj eblas pere de UFE.

VIVO de la GRUPOJ

BEZIERS

Ekde oktobro la kursoj rekomenciĝis, dua- kaj trigradaj kursoj funkcias kun la lernantoj jam konataj. En la urbo, sed ankaŭ en **St Chinian kaj Pézenas**, ni sukcesis starigi unuagradajn kursojn : tiel la interesatoj ne bezonas vojaĝi iom longe por ĉeesti la lecionojn en Béziers.

Evidente tio levas aliajn problemojn por la gvidantoj. Dankon al la sindonemaj instruantoj.

Nun ni devas pensi pri la estonteco. La ĉefa punkto estas la venonta staĝo en Agde : ĝi okazos de la 3a ĝis la 10a de junio do preskaŭ somere, dum unu semajno (kiel petis la antaŭaj staĝanoj) kun unutaga ekskurso, meze de la staĝo, por iom ripozi. Ekde nun rezervu tiun semajnon al la studo aŭ perfektigo de la lingvo antaŭ la UK en Montpellier, unika okazo por provi viajn lingvajn kapablojn. Venontaj kunvenoj de la CBE : **10an de januaro** (ĝenerala kunveno), **14an de februaro** (krespoj post kurantaj aferoj), **14an de marto**, **11an de aprilo** (temoj elektendaj en la antaŭaj kunvenoj). Do ĝis baldaŭ. Bonajn dezirojn por 1998 !

*Gratulojn al la grupo de Béziers, kiu « semas » ekstere
Imitinda ekzemplo ! Menciindas la Zamenhofa tago, kiu
kunigis tridekon da personoj en simpattia etoso. Frandinda
tagmanĝo, kies menueto (ne temas ĉi-kaze pri danco !)
aperas apude. Estis ankaŭ montrita vidbendo pri internacia
kongreso en Valencia lastan someron (raporteto en la antaŭa
SFS).*

SAINT-CHINIAN

Quand la ville se met à l'espéranto

■ Depuis peu, à Saint-Chinian, sont organisés des cours d'espéranto. Ils ont lieu au collège Jean-Jaurès, tous les jeudis. Ces cours ont pris forme grâce au Cercle biterrois d'espéranto qui a ouvert sur le Saint-Chinianais une antenne animée par Jean-Claude Roget.

L'espéranto est une langue internationale qui permet des échanges intellectuels internationaux et une compréhension mutuelle entre les peuples du monde plus efficace.

L'Unesco reconnaît les grandes possibilités qu'offre l'espéranto pour la communication entre les peuples de différentes nationalités. Cette langue tient chaque année un congrès mondial. La dernière fois qu'il a eu lieu en France, c'était en 1957 à Marseille. En 1997, il s'est tenu en Australie, à Adélaïde et le prochain congrès se déroulera en 1998 à Montpellier.

A la même époque sera organisé, à Sommières dans le



Les cours de cette langue seront assurés par Jean-Claude Roget.

Gard, le congrès mondial des enfants espérantistes. Le congrès se tenant en Languedoc, le Cercle biterrois d'espéranto a décidé de grimper vers les Hauts-Cantons et de créer un groupe d'étude sur le Saint-Chinianais. Les débutants sont les bienvenus. La langue est simple d'accès et facile à

apprendre, elle ne contient aucune exception et n'obéit qu'à seize règles, toutes codifiées, regroupées sur une seule fiche facile à emporter. Après un an d'études, on peut communiquer avec les espérantistes du monde entier répartis dans quatre-vingt-dix pays. Tél. 04 67 93 74 71. ●

MENUETO

*amika trinkaĵo kun aperivkuketo,
reĝe donacita de C.B.E.*

La samaj herboj, kiel kutime..

La nemediteranea muŝtranĉaĵo kun sia kortego de ĝardenprodukto.

Frompaĝo el Edeno

Kuko ne manĝebla dum la Internacia Kongreso

Akvo senlime. Vino gut' al gute. kafo

Anoncoj
de kursoj
(Midi Libre)
en St Chinian
24/10 kaj
Pézenas
27/10.

■ Cours d'Espéranto. - A partir du mardi 28 octobre, les cours d'esperanto auront lieu tous les mardis à 18 h 30 à la Maison pour tous (place Boby-Lapointe).



Esperanto-Staĝo
en
AGDE
de la 3a de junio
ĝis la 10a de junio
1998

Karaj geamikoj,

Kvankam apenaŭ sin anoncis la unuaj vintraj malvarmoj, jam ni devas pensi pri la printempa staĝo. Printempa? Jes, sed preskaŭ somera, ĉar ĝi okazos de la 3a ĝis la 10a de junio. Pro peto de multaj staĝanoj, la venonta renkontiĝo daŭros unu semajnon, kaj ni intencas organizi tutagan ekskurson en la regiono - ne devigan evidente - Se vi preferos ripozi en la parko de Batipaume aŭ lacertumi apud la maro, vi estos tute liberaj.

La estroj de Batipaume, lastan junion, ne estis favoraj al la neregula partopreno en la manĝoj kaj restado: tio komplikis ilian laboron! Do ili petas, ke ni estu la sama nombro precipe por la manĝoj. Tamen ili donos "piknikon" por anstataŭi manĝon, okaze de ekskurso. Do la prezo de la restado estos antaŭfiksita por la tuta restado. Ni bedaŭras ne esti tiel "toleremaj" kiel en la antaŭaj jaroj. Tamen ni esperas, ke la staĝa semajno, estos tiel agrabla por vi kaj ankaŭ fruktodona.

S-ino Vincent denove bonvolas gvidi la triagradan kurson. Por la duagrada venos novulo el Italio, S-ro Guzzi. Ni dankas kaj bonvenigas ilin.

Jam de nun rezervu vian laborsemajnon; avertu pri ĝi viajn geamikojn, eĉ se ili neniam lernis la lingvon. Jen bona okazo por komenci en agrabla loko kaj simpatia etoso.

ĝis baldaŭ.

La Prezidantino:

Suzanne Authier.

SÉJOUR LINGUISTIQUE D'ESPÉRANTO
AU PAYS DE LA LANGUE D'OC.

Le Cercle Biterrois d'Espéranto se réjouit de vous annoncer qu'un stage d'Espéranto aura lieu encore cette année au domaine de Batipaume à Agde.

Ce sera une pleine semaine que vous passerez à apprendre en vous relaxant dans un milieu agréable où le soleil ne manquera pas de vous accueillir.

Depuis 13 ans l'accueil de la maison familiale lozérienne, nous a toujours donné satisfaction. C'est pourquoi nous lui restons fidèle malgré quelques petites nouvelles exigences.

Venez donc profiter de nos excellents profs qui se mettent à votre disposition. Vous ne le regretterez pas, surtout pour vous perfectionner: le congrès mondial de Montpellier n'est pas très loin.

ALVOKO...

La staĝo pli longa ol lastjare postulas 7 distrajn vesperojn, fakte nur 6 ĉar la unua tago estas dediĉita al informoj kaj interkonatiĝo. Tamen vi atendas distrojn post streĉa taga laboro. Ni faros nian eblon por vin ĝojigi. Sed estus bone ke la staĝanoj aktive partoprenu.

AL HELPEMULOJ ...

Verŝajne pluraj el vi povos montri sian bonvolemon: iomete paroli pri sia urbo, regiono, klubo, rakonti travivaĵon, ludi skeĉon (legu la ĉi-supra artikolo), kanti(?), muziki(?). -Ne necesas esti spertuloj - kelkaj minutoj sufiĉas, la publiko estas tre indulga.

...eĉ KOMENCANTOJ

Pluraj mallongaj aferetoj agrable plenigas 1 horon (niaj vesperoj neniam estas tro longaj). Ni helpos vin lingve, se vi ne vin sentas lerta en esperanto.

Faru al ni proponoj. Ni kalkulas pri vi, kaj estos dankemaj al vi.

APPEL...

Cette année 6 soirées à organiser (5 en fait car le premier soir sera consacré aux informations pratiques) Nous ferons notre possible pour vous distraire, mais il serait bon que des stagiaires, même débutants prennent une part active à ces soirées

AUX BONNES VOLONTÉS...

Plusieurs d'entre vous pourront faire preuve de bonne volonté: parler un peu de leur région, raconter un événement local, chanter (pourquoi pas?) jouer un court sketch etc... Il n'est pas nécessaire d'être "calé" Quelques minutes suffisent.

...MÊME DÉBUTANTS

Plusieurs petits numéros remplissent agréablement une heure (nos soirées ne sont jamais trop longues et le public est très indulgent) Nous vous aiderons pour la langue si vous ne vous sentez pas très sûr.

Faites-nous des propositions Nous comptons sur vous et vous serons très reconnaissants

La Prezidantino

S A



CERCLE BITERROIS D'ESPERANTO

16a PRINTEMPA
ESPERANTO - STAĜO 1998 EN AGDE
Hérault - France
du 3 juin au 10 juin 1998

Accueil : Mercredi 3 juin après midi à partir de 15h.
Fin du stage : Mercredi 10 juin après midi.
Adresse : Centre de vacances de BATIPAUME
route de Rochelongue - 34300 AGDE

FRAIS DE SEJOUR

Adhésion : 240 FRF jusqu'au 3 mai
: 300 FRF après cette date.
*gratuit pour les moins de 25 ans
ainsi que pour les étrangers.*

Frais de Pension : 1575 FRF par personne en chambre à 2 lits
pour les 7 jours : 1765 FRF en chambre individuelle p.p.



Acompte : 500 FRF p.pers. avant le 3 mai
: 600 FRF p. per. après le 3 mai

Libeller le chèque ou le mandat postal au nom de:
Fédération Départementale Espéranto de l'Hérault"

ADRESSER TOUTES CORRESPONDANCES à

C.B.E.

9, rue du Georges Picot
34500 BEZIERS

 / FAX Sino Authier 0467 311.318; Sro Peray 0467.380.352
 Fino Terral 0467.311.346

CERCLE BITERROIS D'ESPERANTO

16a PRINTEMPA
ESPERANTO - STAĜO 1998 EN AGDE
Hérault - France
de 3a de junio ĝis la 10a de junio 1998

Akcepto : Merkredon la 3an de junio posttagmeze ekde la 15a h.
Staĝfino : Merkredon la 10 an de junio posttagmeze.
Adreso : Centre de vacances de BATIPAUME
Route de Rochelongue - 34300 AGDE

KIOM KOSTOS ?

Aliĝkotizo : 240 FRF ĝis la 3a de majo
300 FRF post la ĉisupra dato .
*Senpaga por la ĝejunuloj malpli ol 25 jaroj
kaj la eksterlandanoj.*

Pensiono-prezo 1575FRF en dulita ĉambro. (*persone*)
septaga pensiono: 1785FRF en unulita ĉambro.



Antaŭpago : 500FRF antaŭ la 3a de majo
600FRF post la 3a de majo.

formulu ĉekon aŭ poŝtmandaton je la nomo de:
"Fédération Départementale Espéranto de l'Hérault"

SENDU VIAJN KORESPONDAĴOJN al

C.B.E.

9, rue Georges Picot
34500 BEZIERS

 / FAX Sino Authier 0467 311.318; Sro Peray 0467.380.352
 Fino Terral 04 67.311.346

coupez

tranĉu

MONTPELLIER :

La 1an de oktobro okazis la jara kunveno (raporto sekvas). La 17an de oktobro Sro Cherpillod bedaŭrinde lastmomente ne povis veni al Montpellier, sed T. Saladin spontanee anstataŭis lin. Dudekon da personoj (duone esperantistoj) allogis la prelego. Vigla diskuto sekvis la vervan kaj riĉargumentitan prelegon. Sekvo de tiu vespero (kaj ĝia preparo) : malfermo de kurso en MPT Marcel Pagnol.

La postan tagon en tiu belega loko (senpaga !), la kastelo kaj parko de Grammont, trideko da esperantistoj ĉeestis la feston de E°. Tri banderoloj anoncis la lokon kaj montris al la promenantoj, ke E° vivas. Cento da invitiloj venigis klubajn esperantistojn, antaŭajn klubanojn, estontajn lernantojn, eĉ scivolemajn promenantojn. Afiŝoj ĉemure kaj surtable anoncis la kursojn (4 unuagrada, 1 duagrada, 1 triagrada) kaj la eblecon pagi kotizojn (4 tion faris !). Jorgos prezentis la librojn, kiuj ne brulis dum la incendio de lia aŭto. Tamen tre riĉa elekteleco allogis plurajn aĉetantojn. S-ro Capus rakontis pri sia esperantista vivo, tre alloga por la kandidatoj al lernado de E°. Yvette Vierne parolis pri la UK ĝenerale kaj la preparo de la Montpellierera. « Midi Libre » unue anoncis kaj poste raportis dank'al artikoloj de Jorgos.

Venontaj kunvenoj en MPT l'Escoutaïre (quartier St Martin) la merkredojn 7an de januaro, 4an de februaro, 4an de marto, 1an de Aprilo. La jara kotizo de 105F inkludas la abonon al « Sudfrancia Stelo ». Ĝi estas pagebla al pĉk/ccp Centre culturel espérantiste 1487-48D, centro de Montpellier. Adreso de la kasistino : Annick Tora, Rés. des Pins CD 17 App 13 1577 Avenue de Maurin 34070 Montpellier.

Jarkunveno de la E°-kulturcentro

Ĉeestas Ges. J. Bès, Capus (x2), R. Aumeunier, M. May, A. Bessadoun, P. Martinez, L. Lentaigne, Y. Vierne, Jorgos. Forpasis Sro Hemery Forlasas la grupon J. Bony Senkulpiĝas L. Ensuque. Poste alvenas Ges. Latapy (X3), A. Tora, H. Laurenti + amikino el la E-grupo de Grenoble, S-ino J. Carrio. Disdoniĝas la unuaj bultenoj pri la UK + aliĝiloj kaj prezoj en FF. Tiuj dissendendas ankaŭ al personaj korespondantoj.

Okazis en lasta jaro : 3 kursoj en kadre de « Tiers Temps » - kongresoj de Figueres (Ge-Latapy kaj Jorgos) kaj de Stuttgart (A. Tora, L. Ensuque) - **Festoj** en l'Escoutaïre (junio) : peto pri kursoj, en Fg Boutonnet (Ge-Latapy, Ge-Cayzac, O. Hamelin, Y. Vierne), en Antigone (6-7 lernantoj) - **Intervjuoj** : Midi Libre (4 kurspetoj kaj unuaj rendevuoj), TV satelita, Radio France Hérault - **Prelegoj** de A. Cherpillod en Montpellier, T. Saladin en Marseillan, Carmon, Perpignan - **Staĝo** de Sète : 44 partoprenintoj (12 malaliĝis en la 2 antaŭaj tagoj pro sanaj malfacilegajoj. Bordoanino helpis por varbado kaj enkasumado. De post majo fine 80 leterojn sendis Yvette Vierne. - **Kotizo** : 105 FF sensanĝe.

- **Venis aliaj proponoj, petoj** pri kursoj en -MJC de Mauguio (J. Bony) - Antigone (R. Aumeunier) - MPT M. Pagnol (T. Margaux, T. Saladin) - 3 kursoj en l'Escoutaïre. Kiu gvidos pliajn kursojn en l'Escoutaïre (vespere !) kaj CS-CAF de La Paillade, kie ni decidus resti pro biblio - teko kaj kurso ? Jorgos sin proponas. - S-ro Roget el Béziers transdonis proponon de kursopeto ĉe EDF - Radio-kursoj (G. Paing, C. Cayzac)

- Lastjare 21 homoj pagis **kotizon**. Pliaj nur por SFS. Restis 8041,51F en Julio 96, 6874,96F nun. Necesas lasi ĉekon de garantio (2500 F) en ĉiu MPT.

- **Ĉiumonataj kunvenoj** okazas la unuan merkredon (krom lernejoj feritagoj) je la 18a horo en MPT l'Escoutaïre. - Estas demando pri oficiala partopreno de CCE Montpellier en la **organizado de UK**. Klubanoj preferas, ke la klubo restu ekstera kaj individuoj engaĝiĝu. Ni aranĝas Feston de E° en Parc Grammont por E-istoj, E-parolantoj, E-amikoj, E-lernemuloj. Tiam ni povos findecidi pri kiom da kursoj, kie, kiam kaj de kiuj gvidataj.

Raportis Jorgos.

Kursoj okazas ĉi-jare : unuagrada - marde (18a h) en l'Escoutaïre - merkrede (18a h) en CS CAF Paillade - ĵaŭde (20a h) en MPT M. Pagnol - vendrede (10h30) en l'Escoutaïre
Duagrada marde je la 9a en l'Escoutaïre kaj **triagrada** vendrede je la 9a en l'Escoutaïre.

Ni pardonpetas pro la malbona kvalito de la artikolo, kiu sekvas (« Midi Libre » 31/10).
Estas ankaŭ kelkaj evidentaj eraroj, ne estos 4000 prelegantoj dum la UK !

LANGAGE

En attendant le congrès mondial à Montpellier

A la découverte de l'Esperanto

Les espérantistes commencent à mobiliser avant le grand rendez-vous de l'été prochain

■ La maison pour tous Marcel-Pagnol accueillait, vendredi, les espérantistes montpelliérains pour une conférence intitulée "L'Europe avec quelle langue". Si le fameux langage mis au point, il y a plus d'un siècle, par le Dr Zamenhof a depuis longtemps aboli les frontières linguistiques, il demeure encore assez peu pratiqué en France.


Cette langue internationale offre pourtant l'avantage d'être facile à apprendre (dix fois plus d'après certains linguistes) grâce à une grammaire régulière qui évite de charger la mémoire avec les irrégularités coutumières aux langues nationales.

Une année scolaire d'études, à raison de deux heures hebdomadaires, peut permet-

tre d'en maîtriser l'essentiel. Et l'année qui vient sera très particulière pour tous les Montpelliérains capables de comprendre cette langue. La ville accueillera en effet le 83e congrès mondial de l'Esperanto l'été prochain. 4 000 à 5 000 conférenciers venant de 70 pays sont attendus à ce rendez-vous, le premier en France depuis 1957.

Outre la conférence de vendredi soir, les espérantistes ont organisé à Grammont une petite fête qui a permis de découvrir les nombreux ouvrages littéraires traduits dans la langue universelle ainsi que des essais se prononçant pour "la solution Esperanto". Une cérémonie qui s'est terminée en chansons... adaptées en Esperanto, bien naturellement.

Les cours. Toutes les personnes intéressées par ce langage, qui ne s'est jamais départi d'une certaine philosophie humaniste et généreuse, peuvent se renseigner au centre



La littérature française est également traduite en Esperanto

culturel Esperanto, 5, rue du Docteur Roux.
Tél. : 04 67 54 15 43.

A partir de La Toussaint, des cours pour débutants sont donnés à la MPT L'Escoutaire (de 18 h à 19 h 30 le mardi et de 10 h 30 à 12 h le vendredi), le mercredi au centre social

CAF La Paillade (18 h à 19 h 30) et le jeudi à la MPT Marcel Pagnol.

Un cours progressif est proposé le mardi de 9 h 30 à 11 h à la MPT L'Escoutaire qui accueille également un cours supérieur le vendredi de 9 h à 10 h 30.

PERPIGNAN :

La ĝenerala kunveno de nia grupo okazis la 8an de oktobro 97 ĉe nia sidejo.

-La traduko de « Historio de la Urbo Perpignan » estas finita ; mankas, la presado, la korektoj, bindado kaj prezento de la tuto.

-Dum somero ni ricevis du librojn, unu por la urba biblioteko, la alia por S-ro Llech-Walter. Tiuj libroj rakontas la vivon de Doktoro Hanaoka Seigu, kiu estis la unua praktikante operacion per ĝenerala anestezo. Tiu sendo okazis kadre de la ĝemeligo inter nia urbo kaj Wakayama (Japanio) Niaj japanaj amikoj vizitos nin antaŭ la UK de Montpellier.

Kiel lastjare ĉiumarde Sro Bénazet gvidas mezan kaj perfektigan kursojn. Kvin personoj informiĝis pri la internacia lingvo, unu aliĝis. Sro Gérard-Voincon gvidas la inĉadkurson. La kursoj estis anoncintaj ĉe Radio France-Roussillon, Radio Arrels kaj gazeto « l'Indépendant » kaj « Midi Libre ».

La 6an de januaro, ĉe la sidejo, Radio France Roussillon intervjuis Sron Llech-Walter. Ni disdonis « la unuan rendevuon » ĉe aneksaĵoj de la Urbdomo.

Esperanto

Les membres du Centre Culturel des P.O. pour l'Esperanto se sont réunis dernièrement en assemblée générale, sous la présidence de René Llech Walter.

Plusieurs points étaient à l'ordre du jour :

- Les résultats des examens d'Esperanto de fin juin,
- Le courrier reçu d'Adélaïde (Australie) à l'occasion du 83ème congrès international auquel ont assisté, sans l'aide d'aucun interprète, 1241 délégués de 57 pays. (Le prochain congrès international aura lieu à Montpellier, du 1er au 8 août 1998),
- Les échanges en Esperanto avec la ville de Wakayama, Japon, jumelée avec Perpignan,
- Le programme de mise au point de la traduction des textes figurant sur les bornes, à travers la ville, à l'intention des touristes espérantistes venant de Montpellier,
- L'organisation des cours

Pour toutes les personnes intéressées, il est encore possible de s'inscrire aux cours de débutants en s'adressant au Centre Culturel des P.O. pour l'Esperanto, 72 av. du Gal de Gaulle à Perpignan.

Tél. : 04 68 34 22 18, ou 04 68 55 51 77, après 20 h.

GARD

Daŭre mankas informoj pri tiu departemento. En Nîmes grupeto kunvenas ĉiulunde en la « Domo de Eŭropo ».

LOZERE/AVEYRON : T. Saladin programis plurajn prelegojn : decembre kaj januare en Marvejols (dekstre anonco aperinta en « la Lozère nouvelle ») marte en Mende. En Decembro ĉeestis dekkvino da personoj, vendiĝis pluraj kursoj. Mezjanuare ĵurnalisto, kiu laboras por « la Lozère nouvelle » kaj radio-stacio venis al La Canourgue por intervjuo.

Pri Aveyron vi legos iom malpli en SFS, pro tio ke ĝi kunlaboras nun en nova federacio, nome « Midi-Pyrénées », kies prezidanto estas ĝuste Bernard Legeay. Dekstre anonco de kursoj en « Midi Libre » de la 10a de oktobro.

FEDERACIO MIDI-PYRENEES

Bone, ke revigliĝas najbara federacio kaj ni deziras al ĝi bonan sukceson. Kompreneble ni volonte kunlaboros kun ĝi. En la konsilio elektita la 4an de oktobro krom la prezidanto estas vicprezidantino Sylvie Roques, sekretario Christian Lavarenne kaj kasisto Georges Comte / Jorgos. La unua grava decido estis relanĉi federacian bultenon, kiu aperos venontprintempe, kun trimonata aperiritmo. SFS anticipipe salutas sian frateton.

KATALUNIO :

Bondezirojn al niaj geamikoj en Katalunio, kies 300a bulteno portas sur la frontpaĝo grandan reproduktion de la afiŝo de la 83a UK. Dankojn kaj ĝis baldaŭ !

« ESPERANTO »

En la januara numero estas du artikoloj subskribitaj de personoj konataj en nia federacio. La unua tutpaĝa temas pri « alispeca turismo en Kubo » spertita de nia amiko Vilhelmo Lutermano. La dua estas recenzo de la libro « La korpo de la homo ; enkonduko al konstruo kaj funkcio » sub la plumo de D-ro Blaise Berthonneau, kiu regule proponas al vi krucvortojn en SFS. Gratulojn al ambaŭ aŭtoroj !

FR3 : Questions pour un champion :

Antaŭ kelkaj semajnoj unu el la kandidatoj estis nia samideanino Jeannine Bony el Montpellier, kiu trovis la okazon iom paroli pri esperanto. Antaŭ nelonge estis ĝuste alia demando pri E°.

Conférence**L'EUROPE, MAIS AVEC QUELLE LANGUE ?**

"L'Europe, mais avec quelle langue", tel sera le thème de la conférence donnée par Thierry Saladin, à la Mairie de Marvejols, le mardi 20 janvier à 20 h 30.

L'Union européenne comporte à ce jour 15 nations parlant 11 langues officielles sans compter les langues régionales. Or tout se passe comme si cette Europe avait choisi de parler l'Anglais dans les relations internationales.

Cette langue en 3^e position par le nombre de locuteurs en Europe derrière l'Allemand et le Français envahit tout (médias, publicité, mode, cinéma, jeux...).

Les élèves ne choisissent plus la première langue vivante à l'entrée en 6^e. A 90 % ils sont orientés vers l'Anglais.

Où est le choix ? Où est la défense des cultures pronée par nos "politiques" ? Au fait l'Anglais, mais pourquoi pas... ?

Dans l'absolu peut-être mais cette langue est nationale ; donc non neutre de plus elle n'est pas conçue pour jouer ce rôle de langue véhiculaire.

Sa grammaire bien plus complexe qu'on ne le prétend et son vocabulaire immense (ce qui est une richesse) nuisent à son apprentissage pour un non anglo-

phone. Il en serait de même pour l'Espagnol, le Français ou l'Allemand si les États-Unis, première puissance mondiale parlaient l'une de ces langues. Car il ne faut pas se voiler la face, ce sont bien les États-Unis qui imposent l'Anglais où du moins sa forme américaine comme moyen de communication.

Cette situation imposée est donc injuste, inefficace, nuisible et... coûte fort cher au contribuable. Pourrait-on faire autrement ?

Oui si nos gouvernants prenaient avec courage les bonnes précisions en accord avec leurs propos. Car, il n'en est rien ! L'orateur démontre que l'humanité pour des raisons irrationnelles refuse de voir les problèmes en face, refuse la solution qui s'offre à elle.

À la manière d'un consultant, l'orateur pose le problème, bouscule des idées reçues et propose une solution généreuse, fraternelle reposant un des principes d'égalité entre les peuples et permettant peut-être à ce monde de devenir meilleur.

Il en a bien besoin... !

(Entrée libre).

Club espéranto

■ Comme chaque année, le club espéranto de la MJC attend début octobre pour se mettre définitivement en place. Il est donc encore temps de s'inscrire.

Outre ses activités habituelles qui sont l'apprentissage de la langue internationale espéranto, l'accueil de conférenciers et l'organisation de concerts, le club propose cette saison la création d'une activité "correspondance". Vous pouvez franchir la barrière de la langue grâce à des réseaux d'adresses de personnes dans le monde, le moyen de communication commun étant l'espéranto, langue dont vous pourrez très rapidement acquérir les bases en devenant membre du club. Pour tout renseignement, contacter la MJC au tél. 05 65 67 01 13 ou M. Legeay au tél. 05 65 67 10 72.

Pour découvrir la
LANGUE INTERNATIONALE
ESPÉRANTO

lisez le bulletin trimestriel



ESPERANTO-info Hortensias 2
121bis Bd Napoléon III 06200 NICE
C.C.P. Marseille 11 901 46 B - T. 04 93 83 08 73

en français

Abonnement simple : 25 F - de soutien : 35 F.

DU 14 FEVRIER AU 21 février 1998

PROGRAMME

BULLETIN D'INSCRIPTION
à retourner à Georges COMTE
07, Rue de L'ESPERANTO
09120 ST FELIX DE RIEUTORT

9^e



CHANT CHORAL et ESPERANTO

Ce stage est réalisé pour
le CHŒUR ESPERANTO TRANSPYRENEEN
par le Cercle d'Etudes Espérantiste de l'Ariège
avec l'aide du centre d'accueil de la Freychède
et des chorales locales.

INFORMATIONS: 0561.608.683 et 0561.681.744.

Chaque jour de 9 heures à midi et de 17 à 19 heures


CHANT CHORAL

Sous la direction de: *Zdravka BOJČEVA* chef de chœur
à Sofia (Bulgarie), Interprétation d'œuvres traditionnelles, classiques, modernes et originales.

Les après-midi seront réservées au ski de fond, à l'étude de l'Espéranto ou à des visites touristiques et culturelles.

Les soirées seront dédiées aux jeux, à la détente, aux débats et aux échanges avec d'autres chorales locales.

N.B. : Si des stagiaires non-choristes assez nombreux s'annoncent, nous organiserons des cours d'initiation à l'Espéranto et des jeux aux heures "chant".



- ♦ Prénom:
- ♦ Nom:
- ♦ Né(e) le :
- ♦ Adresse :
- ♦ C.P. Ville :
- ♦ Téléphone :
- ♦ Profession :
- ♦ Voix : Soprano Alto Ténor Basse
- ♦ Je réserve :chambre(s) avec lit à 2 places
- ♦lits 1 place en chambre à 2-4 lits

TARIFS (sans hébergement)		
Inscriptions	jusqu'au 15. I. 1998	après le 15.I.1998
<15 ans ou 3e d'une famille participante	160,00 FFs	240,00 FFs
de 15 à 26 ans ou 2e d'une même famille	240,00 FFs	320,00 FFs
> 26 ans	320,00 FFs	400,00 FFs

Règlement à l'ordre de : C.E.E.A. CCP 2579 34 E TOULOUSE

Je verse FFs d'inscription
+ FFs d'arrhes (minimum 500 FF) pour
les repas et l'hébergement (comptez max. 1200 FF)
SIGNATURE:
(obligatoire)

En cas de desistement (jusqu'au 01 février) seuls les prix des repas sont remboursés.

Europanto

En la lastaj semajnoj pluraj grandaj naciaj gazetoj kaj radiostacioj publikigis artikolojn pri nova artefarita lingvo "europanto".

Temas pri ŝerco elpensita lingvo, miksaĵo el la diversaj lingvoj parolataj en la eŭropa brusela burokrataro. La ŝercon iniciatis Diego Marani, itala tradukisto deĵoranta ĉe la Eŭropa Ministra Konsilio, kiu publikigis kelkajn specimenojn en la belga gazeto "Le Soir".

Fine de aŭgusto li komencis publikigi novelojn en europanto en la belga semajna gazeto "Le Soir illustre", kaj ankaŭ kurso komencis aperi.

Kvankam ĉi-lastaj faktoj povus indiki, ke Diego Marani komencas preni sin serioze, la afero restas ŝerco, kiu amuzas multajn bruselanojn, homojn ĝenerale havantajn ian bazan scipovon de la ĉefaj eŭropaj lingvoj kaj do senpene komprenantajn frazojn kiel *Maybe trinque tu etwas? No? Dommagio! Was nome tich?* ("Eble vi trinkos ion? Ne? Bedaŭrinde! Kio estas via nomo?").

Laŭ la artikolo en Sunday Telegraph, la apero de europanto estis rigardata kiel atako fare de la esperantistoj. Se tiel estus, oni povus bedaŭri tiun reagon, ĉar ĝi rivelus mankon de humursento kaj nekomprenon pri la psikologia aspekto de la fenomeno.

Fakte, europanto faras al ni grandegan servon. La malfacileco progresigi akcepton de Esperanto ja grandparte ŝuldiĝas al psikologia rezisto, bazita sur antaŭjuĝaj rezonoj kiel "Lingvo elpensita de unu homo

ne povas funkcii", "Miksaĵo ne havas valoron", "Ne eblas ridi kaj ŝerci en artefarita lingvo", ktp. - Nu, europanto atakas tre konkrete tiujn ideojn. Ĝi adaptas la mensojn al la ideo, ke io miksa, iniciatita de unu homo, povas funkcii kaj eĉ havi amuzan aspekton.

Krome, la finaĵo *-anto* en europanto estas agnosko pri la ekzisto kaj funkciado de nia lingvo.

En individua psikoterapio, kiam rezisto komencas ŝanceliĝi, tre ofte aperas tiaj kompromisaj pseŭdosolvoj, kies funkcio ŝajne estas laŭgrade prepari la menson al radika ŝanĝo de io ĝis tiam netuŝebla.

Simile, oni povas vidi en la apero de europanto transiran etapon


inter la babelaj sistemo nuntempa kaj la vera solvo, la nia. La artikolo en *Courrier international* (04.09.97) finiĝas per frazo, kiu povas faciligi al la legantoj pripensadon pri la solvo Esperanto, nome: "Eŭropa Unio elpezas pli ol 3 miliardojn da francaj frankoj jare por traduki kaj interpreti en la dek unu oficialajn lingvojn; tiu sumo ŝpariĝus, se ni ĉiuj parolus europanton". Sufiĉas, en tia propono, legi "esper" anstataŭ "europ" por pasi de la transira mensa sinteno, pure ŝerca, al serioza kaj saĝa konsiderado.

Ni ne ataku europanton, sed priparolu ĝin kiel pruvon pri la graveco de la problemoj kaj nekonscian intuicion pri la vojo sekvinda.

Claude Piron

101560.504@compuserve.com

Rim: Daŭrigo en la sekva numero -ndlr



"Mi bone ricevis vian leteron de la 19-a de februaro kaj la antaŭan. Mi klopodas respondi al ĉiu kiuj skribas al mi rilate al Europanto, sed bedaŭrinde mia korespondado iom postrestis.

Unue, mi deziras precizigi ke Europanto nur estas ŝerco kaj ke mi neniel pretendas proponi mian etan amuzilon kiel internacian lingvon. Laborente en internacia medio kiel tiu de la eŭropaj instancoj, mi demandis min kiun rezulton povus havi miksaĵo de ĉiuj lingvoj kiujn mi ĉiutage aŭdas en la koridoroj. Estas afero tre taŭga por ŝerco. La sentemo de la belga socio al lingvoproblemoj, realaj kaj fikciaj, faris la reston.

Mi plene komprenas la rolon kiun vera internacia lingvo kiel Esperanto povus havi je eŭropa nivelo. La plilarĝigo de niaj institucioj baldaŭ sursceneigos la demandon pri lingvoj, kiu unualoke estas politika demando.

Sed, kiel vi certe jam konstatis, la homoj kiuj estas konstruataj Eŭropon, estas iom timemaj se temas pri la ideo de Esperanto kiel pontlingvo.

Konkludante, mi certigas ke mia Europanto ne volas konkurenci Esperanton.

Esperanto naskiĝis el nobla kaj malnova ideo, kiu ĉiam ekzistis ĉe la plej kleraj eŭropaj intelektuloj. Europanto nur estas amuzilo, komika rimedo por atentigi la homojn pri la estonto de multlingva Eŭropo kaj por banaligi la lingvoproblemon de Belgio kiu, por eksterlandano kiel mi, foje atingas vere patosan nivelon.

Dankante vin... Diego Marani"

Kunmetaĵo de tesktoj pri Europanto (el « Eventoj ») supre kaj ekzemploj el la gazeto « Le Soir » pri la eltrovaĵo de Diego Marani.

DER EUROPANTO BRIKOPOLITIEK

KOMME CHANGE FAUSSE EURO
IN ECHTE DEUTSCHMARK

WHAT BESOGNE:

100.000 KOKILLES ST. JAK VIDES

200.000 PALOURDES VIDES

1 DEHAENE

1 HELICOPTERO AGUSTA

1 MASK VAN KARNIVAL DE PORCELET

1 ROSA CANINA

1 METRE CORDE

1 TOLE COLOR BLEU VAN 1 M X 1 M

15 STARS GEDORÉ

1 FALSE GRAINDEBOTÉ

1 FEUTRE BLACK

1 MEGAFONO

1 FLACON PARFUM "EGOLSTE"

2 SPADRÀ

15 SQUARE METRES VAN INTIEME LINGE

(COLOR: RUBRO)

50 LITRES BATH MOUSSE

1 TON TALK LAVANDE

1 BOTELLA OUDE GENEVER

NOTIZ AAN

DES LECTORES

PS: Si no comprende esta compte de Noël, no panic: esta perfectly normal. Er ist écrit in der erste overeuropeese tongue: the Europanto. Europanto ist 42% English, 38% French, 15% le rest van de UE tonguen und 5% mixed fantasia mots out from Latin, unlikely-old-Greek et mucho rude Italian Jurones. Basta.

Naar de Bigge Markt alleren für el Noël Marché. Colle les 15 stars gedore sur la tôle, write mit el feutre sur every kokille St. Jak "1 Euro" y sur every palourde "1 zentime", prend el megafono und crje: "Euros, frische Euros! Ki want frische Euros!! 1 Deutschmark égal 1 Euro. Offre van lancement!"

Kwando habe alle de kokille (pardon, de Euros) gesold, ga al GB, buy une botella van Oude Genever y offre la à Dehaene por Noël: el deserved it!

Diego Marani.

ALVOKOJ *Diversaj alvokoj kaj helpopetoj aperas sur tiu paĝo. Legu kaj decidu, ĉu iuj el ili*

meritas vian subtenon aŭ apogon. La projekto « EO kaj réinsertion » estas aparte kaj detaligita. Pri la aliaj SFS volonte sendos al vi detalojn.

Toulouse : Infanoj el Sarajevo

Geleernantoj de la kolegio de Castanet, kiuj lernas esperanton kaj korespondas kun samaĝuloj en Sarajevo volas inviti dekon da ili pasigi ferimonaton en nia regiono, eventuale partopreni la infankongreseton en Sommières kaj la kongreson de Montpellier. Pluraj asocioj jam promesis helpi sed individuaj subtenoj estos bonvenaj. EKC, 1 Rue Jean Aillet 31000 Toulouse

Toulouse : Muziko (Eurokka)

Nia konata amiko Floreal Martorell kaj Vinilkosmo lanĉas la projekton « Kolekto 2000 ». Temas pri kompaktdiska kolekto, kiu startos en printempo 98 (ĝis 2000 aŭ 2002 !) kun minimume 6 ĝis 8 titoloj. La unua estos kun Jomo, la dua kun kantoj de Brassens en E° interpretitaj de J. Yvart (speciale preta por la UK de Montpellier), ktp. Vi povas aboni unuopan numeron (60F+ sendkostoj) por ĉiu titolo, aŭ aboni la tutan serion (10 numeroj/400F +sendo-kostoj). Eurokka 31450 Donneville

Lyon : 1001 langues, kotopo

Temas pri multkultura ejo, informejo pri E°, trinkejo internaciema, ktp pripensita de junaj esperantistoj. Ĝi malfermiĝos tre baldaŭ, se sufiĉe da mono estos trovita. Oni povas esti membro (jara kotizo 120F), donacanto (repago de la sumoj, se « kotopo » ne naskiĝos), Fondinto, pruntedoni sumon sen interezo. Ambicia kaj originala projekto. Kontaktadreso : Pascal Lécaille BP 3019, 69394 Lyon Cedex 03

Grésillon : adapta

Konformigo de ĉambroj estas necesa laŭ la novaj eŭropaj normoj por funkcii kiel fericentro. Do urĝas la financado ! Kultura Esperanto-Domo, Grésillon 49150 Baugé

Partopreno de Afrikanoj en la UK

Por ili estas nekredeble malfacile partopreni : vizoproblemoj, kosto de la flugoj, financado de la restaĵo. Se ni volas, ke la UK estu vere plej internacia, solidareco necesas. Same pri pli proksimaj orienteŭropanoj, kiuj estus dankemaj, se vi helpus ilin solvi la loĝproblemon dum la UK. Sendu proponojn al SFS !

Domintersanĝo

Familio el Prago proponas interŝanĝi sian loĝejon dum parto de Aŭgusto kun familio loĝanta en aŭ apud Montpellier (kompreneble ne necese esperantista). Se inter viaj geamikoj, troviĝas iu, kiu ŝatus malkovri tiun beleĝan urbon...

Ni estas tre dankemaj, se vi kontribuos al progresigo de unu el la menciataj projektoj ; Nun pri la UK :

luj el vi jam anoncis sin por deĵori dum la UK. Ju pli multaj ni estos, des pli malpeza estos la tasko por ĉiu. Aliaj proponoj estos bonvenaj. Permesu, ke mi iom insistu pri mia fako « ekskursoj ». Leteroj al eventualaj helpontoj restas ofte... sen respondo aŭ venas unu el la jenaj respondoj :

« mi ne estas sufiĉe kapabla », « mi ne sufiĉe bone konas la regionon », « mi timas »...

Kompreneble oni ne povas subite ĉiĉeroni. Preparado de komentoj aŭ surloka vizito helpas. Ne necesas esti eminenta esperantisto, la vortprovizo rilatos nur kun unu temo (aŭ du lokoj) kaj certe estas multe malpli malfacile ol tuja interpretado, kiun malmultaj el ni kapablas fari.

Ĉar la ĉiĉeronoj venos de aliaj regionoj, estus bone, se inter niaj federacianoj estus kelkaj, kiuj konsentus akompani ilin por montri la vojon, por praktika helpo, eventuale por prizorgi parton de la grupo por unu vizito, ktp. Liston de la ekskursoj vi trovos ĉi-poste. Ni kalkulas pri vi !

Jean Hénin

Antaŭ-kaj postkongresoj : la listo estas nun oficiala kaj baldaŭ aperos en la kongresa dua bulteno. Antaŭkongresoj en Parizo kaj en la Alpa regiono. Postkongresoj en Provenco, Katario kaj de Tuluzo ĝis la Luar'valo.

UK/EKSKURSOJ stato en Januaro 98

Novaj Kodoj :

Tuttagaj ekskursoj marde : *Fontaine de Vaucluse*

E1 : Avignon, Cabrières E2 : St Jean du Gard, Anduze E3 : Demoiselles, Navacelles, Couvert-ade
E4 : Carcassonne, Limoux E5 : Aigues-Mortes, Arles E6 : Kamargo

Duontagaj ekskursoj :

D1 : Festo de Mondcivitanoj en Aubais

D3 : Perrier

D5 : Lago Thau, Kanalo de la Sudo, Agde

D7 : Dinosaurioj, Ecosite

D9 : Kluzoj de Fonsérannes, Ensérune

D11 : Pont du Gard, Nîmes

D13 : Clermont l'Hérault, Mourèze, Cabrières

D2 : Montpellier per trajneto

D4 : Les Baux

D6 : Clamouse, St Guilhem

D8 : Thau, Bouzigues (ostroj)

D10 : Pézenas

D12 : Sète, Fortant de France

KALENDARO :

	matene	posttagmeze
SABATE		D1 D2
DIMANĈE		D2 D5 D9 D11
LUNDE	D3 D4 D8	D2 D5 D12
MARDE	6 TUTTAGAJ EKSKURSOJ	: E1 E2 E3 E4 E5 E6
MERKREDE	D6 D7 D8 D10	D2 D9
ĴAŬDE	D4 D10 D13	D2 D11 D12
VENDREDE	D3 D6 D7 D13	D5 D11 D12


DIVERSAĴOJ :

Sat-Amikara kongreso :

Paske proksime de St Briec. 4taga kant-staĝo (7-10 Aprilo) antaŭos la kongreson. Infanoj 6 ĝis 14 jaraj povos partopreni infanan kongreseton. Ekskurso al Dinan, Cap Frehel.

Tradukiloj :

Nova tipo de tradukilo aperis, temas pri skanilo, kiun vi metas sur la tradukotan vorton kaj tuj vi havas la tradukon (aŭ unu tradukon !). Kosto : 1000F. Certe helpilo por izolitaj aŭ nekonataj vortoj sed pri frazoj, vi devas iom cerbumi pri la signifo.



Les langues du monde : speciala dosiero de « Pour la science » (45F, ISSN 0153 4092) estas informplena kaj leginda.

Ĉefaj ĉapitroj : naskiĝo de lingvaĵo, historio de lingvoj (kun duonpaĝo pri E^o kaj unu paĝo pri europanto), informatika helpo. La konkludo de la lasta ĉapitro estas, ke neniuj maŝino ĝis nun kapablas traduki tekston pro la diversaj eblaj tradukoj.

Ĵus ricevita ! foto de informpanelo pri la UK, pentrita de nia amiko Renato Figueira, kaj kiu reklamas en la montrofenestro de la asocia sidejo en Perpignan.

MONTPELLIER

du 1^{er} au 8 Août 1998

CONGRES MONDIAL D'ESPERANTO

La plus grande manifestation internationale sans interprète!

4000 CONGRESSISTES DE 66 PAYS
UTILISERONT LA LANGUE INTERNATIONALE
ESPERANTO AU COURS DES DIVERSES
ACTIVITES CULTURELLES ET RECREATIVES
DE CETTE VASTE RENCONTRE

Forpaso : Forpasis en la Pariza regiono (95 Viarmes) Roger Motto, kiu deĝoris en pluraj urboj de nia regiono (Arles, Avignon, Béziers) kiel fervojisto. Li ankaŭ estis tre agema en la E^o grupo de Avignon. Ni kondolencas al lia familio.

Association « Réinsertion et Espéranto »

à but non lucratif selon la loi 1901

Siège social :

Résidence Vigne de la Vierge
147, Avenue Paul BRINGUIER
34080 MONTPELLIER.

Composition du bureau :

Président : Thierry SALADIN, Médecin
Trésorier : Patrice BRANDY, Médecin
Secrétaire : Josie ESTOPINA, sans profession.

Objet Social :

L'association « Réinsertion et Espéranto » a pour but la réinsertion par l'apprentissage de la langue internationale, des chômeurs, des bénéficiaires du RMI et des jeunes en difficulté.

Origine du projet :

L'espéranto en 1997 ne se porte pas si bien que cela en France et notamment en Languedoc Roussillon. Face au rouleau compresseur anglo-américain, rien ne résiste, et les jeunes ne semblent attirés que par la culture Américaine, d'autant plus qu'ils ignorent l'existence même de cette idée généreuse et fraternelle que supporte l'Espéranto.

En ce monde que l'on dit rétréci par la mondialisation, ne s'offrent à la jeunesse que deux options :

- ☛ L'exclusion pour les uns,
- ☛ Le travail dans la peine pour les autres.

Un monde où ceux qui gagnent ne réussissent que parce que d'autres perdent.

L'espéranto pourrait constituer une 3^{ème} voie, celle de la connaissance et la découverte de l'autre par l'accès aux autres cultures, par la fraternité, la générosité, l'égalité que dégage l'idée interne de l'Espéranto.

PROJET :

Dés le début de 1998, une dizaine de jeunes pourront bénéficier d'un enseignement gratuit de l'Espéranto. L'idée consiste à tenter leur réinsertion en leur fournissant un bagage intellectuel par un enseignement de 10 à 12 heures par semaine.

Au début le choix des élèves se fera bien sûr selon le volontariat mais également d'après un cursus scolaire minimum égal à BAC + quelquechose.

L'association pense que très vite certains parmi eux, outre les progrès accomplis en peu de temps, s'impliqueront de plus en plus dans l'Espéranto.

De plus, chaque année un voyage touristique d'une dizaine de jours sera organisé vers les pays de l'Europe de l'Est. Ceci pour leur permettre de vérifier in-situ l'efficacité et l'utilité de l'Espéranto.

Pour 1998, et pour des raisons de démarrage, il ne sera pas possible d'organiser ce voyage mais au contraire d'impliquer les élèves dans l'accueil des congressistes sous une forme qu'il conviendra de déterminer avec le LO-KO-KO le moment venu.

Nous pensons qu'il sera même possible d'obtenir de certains en deux voire trois années l'acquisition du niveau 3 (Kapableco c'est à dire « capacité » en Espéranto)

L'association envisage très sérieusement de proposer une embauche à ces jeunes diplômés sous forme de CDD puis en CDI afin qu'ils deviennent à leur tour soit :

- des enseignants de l'Espéranto
- des voyagistes
- des animateurs d'une structure de type KOTOPO conçu par nos amis Lyonnais.

L'idée consiste en leur implication d'une manière active au sein de l'association afin d'entrevoir d'autres possibilités de diffuser l'Espéranto.

Pour cela, il faut de l'argent !

Le projet a été déposé devant les collectivités locales du Languedoc-Roussillon et de Montpellier.

Néanmoins l'appel aux donateurs privés est indispensable.

Merci de nous aider si comme nous, vous souhaitez aider notre jeunesse à s'en sortir et l'Espéranto à se répandre. Sachez que les initiateurs du projet mettront les moyens financiers pour le réaliser.

Aidez les !

Une attestation vous sera adressée pour tout don égal ou supérieur à 200 F (= montant de la cotisation de membre bienfaiteur)

Nous vous rappelons que la déduction fiscale atteint 50 % de vos dons à une association à but non lucratif de caractère philanthropique, social ou culturel dans la limite de 1,75 % de votre revenu imposable pour 1997. Alors, avant le 31 décembre, à vos calculettes ... et merci d'avance.

Bien entendu, chaque membre bienfaiteur recevra une invitation à l'Assemblée Générale annuelle de l'association et son compte-rendu.

A Montpellier, le 1^{er} décembre 1997


Le Président,



Le Trésorier,




Diŝtra Paĝo Krucvortoj



HORIZONTALE

- I) Nepra rendevuej(o).
- II) Neĝomalsano.
- III) Nestoro.
- IV) Du el tri / Intesta verm(o).
- V) Erapart(o) / Restarigenda bank(o).
- VI) s : Inklino / Ŝaf(o).
- VII) Vidhelp(o) / Aspekt(o) de la antaŭa / Prefikso.
- VIII) Por viroj aŭ virinoj / Platfunda boat(o).
- IX) Pratem(o) / s : Malmola bazo.
- X) s : Iom da flua akvo / Muzika ĝenro.

s : sone



VERTIKALE

- 1) Venonta cel(o).
- 2) Plej multaj por la antaŭa !
- 3) s : Helena vento / Numeralo.
- 4) Azia surplanko / Ornama herb(o).
- 5) El la buŝo / Azia princip(o).
- 6) Nemanĝebla krem(o) / Koloraĵ(o).
- 7) Molusk(o) / Klereg(a).
- 8) Malofta metal(o).
- 9) Ruĝa kalia sal(o) / Entrepren(o)
- 10) Harema juvelo.

Solvoj de la 142-a

I	A	N	A	K	R	O	N	I	S	M
II	N	E	M	O		L	A	N	T	I
III	A	M	E	N	D	I		F	E	R
IV	T	A	R	S	E	R		A	R	M
V	O	T	I	T		K	O	R	E	E
VI	M	O	K	E	M	A		K	O	K
VII	i	D	A	L		G	E	T	T	O
VIII	i		N	A	D	I	R		O	F
IX	S	P	A	C		O	C	I	M	A
X	T	O	R	I	J		O	G	I	G
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10

BOPARO

Krucvortoj de la 13a de Januaro en « Midi Libre »

HORIZONTALEMENT

- 1. A effectuer lorsqu'on demande réparation. Use de subterfuges.
- 2. Piège tendu par la police. Avec lui on arrive à se comprendre.
- 3. Changements de pos-

	A	B	C	D	E	F	G	H	I	J	K	L	M	N	O	P	Q
1	D	E	P	A	N	A	G	E		F	I	N	A	S	S	E	
2	A	L	I	N	B	A		E	S	P	E	R	A	N	T	O	
3	M	U	T	A	T	I	O	N	S		R	E	V	E	R	S	E

La venonta SFS aperos fine de Aprilo. Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 15a de Aprilo kaj respekti la limdaton.
SFS ĉe Jean Hénin
Beauregard, Rte de Montcayroux
48500 La Canourgue